

VERKARO de la E.E.L., No. 1



# LA LIBRO DE KOMUNA PREGO.

KAJERO UNUA.

*ENHAVO DE ĈI TIU KAJERO:*

LA ORDO DE MATENA PREGO.

LA ORDO DE VESPERA PREGO.

ĈE MATENA PREGO.

LA LITANIO.

---

*Eldonita de*

LA EKLEZIA ESPERANTISTA LIGO.

*Administrejo:*

FARNLEY TYAS VICARAGE, HUDDERSFIELD, ANGLUJO.

1919.

*Prezo: Sm. 0.354 afr. (8½ p.).*

*Abonprezo de Kajerroj 1-5: Sm. 1.75, afr. (3 ŝ. 6 p.).*

# LA ORDO DE MATENA PREGO,

ĈIUTAGE DUM LA JARO.

¶ *Je la komenco de Matena Preĝo la pastro legu laŭvoĉe unu aŭ pli el ĉi tiuj frazoj el la Skribo, kiuj sekvas. Poste li diru tion, kio estas skribita post tiuj frazoj.*

**K**IAM la malpiulo sin turnas for de siaj malbonfaritaĵoj, kaj agos laŭleĝe kaj juste, li konservos la animon.—*Ezek.* 18. 27.

Miajn kulpojn mi konscias kaj mia peko estas ĉiam antaŭ mi.—*Ps.* 51. 3.

Kaŝu vian vizaĝon de miaj pekoj, kaj ĉiujn miajn krimojn elstreku.—*Ps.* 51. 9.

Oferdon al Dio estas spirito suferanta: koron suferantan kaj humilan vi, Dio, ne malŝatas.—*Ps.* 51. 17.

Vian koron kaj ne viajn vestojn disŝiru, kaj turnu vin al la Eternulo, via Dio: ĉar li estas favorkora kaj kompatema, longetolerema kaj tre bona, kaj pentanta pri la malbono.—*Joel* 2. 13.

Al la Sinjoro, nia Dio, apartenas kompatoj kaj pardonoj, kvankam ni ribelis kontraŭ li: nek obeis ni la voĉon de la Eternulo, nia Dio, ke ni sekvu lian instruon, kiun li donis al ni.—*Dan.* 9. 9, 10.

Eternulo, punu min, sed

justece; ne en via kolero, por ke vi ne neniigu min.—*Jer.* 10. 24; *Ps.* 6. 1.

Pentu, ĉar alproksimiĝas la regno de la ĉielo.—*Sta.* *Mat.* 3. 2.

Mi leviĝos kaj iros al mia patro, kaj diros al li: Patro, mi pekis kontraŭ la ĉielo kaj antaŭ vi, kaj mi jam ne indas esti nomata via filo.—*Sta.* *Luko* 15. 18, 19.

Ne eniru en juĝon kun via sklavo, ĉar neniu vivanta povos praviĝi antaŭ vi.—*Ps.* 143. 2.

Se ni diras, ke pekon ni ne havas, ni nin trompas, kaj la vero ne estas en ni: sed, se ni konfesas niajn pekojn, li estas fidela kaj justa por pardoni al ni la pekojn, kaj nin purigi de ĉia maljusteco.—*I Epis. de Sta. Joh.* 1. 8, 9.

**K**ORE amataj gefratoj, en diversaj lokoj la Skribo nin instigas konscii kaj konfesi niajn multspecajn pekojn kaj malbonecon, kaj ne prihipo-

## MATENA PREGO.

kriti kaj kaŝi ilin antaŭ la ĉiopova Dio, nia ĉiela Patro; sed, ke ni ilin konfesu el koro humila, modesta, penta, kaj obeema; por ke ni ricevu pardonon pri ili laŭ lia senlima boneco kaj kompatato. Plie, kvankam ni ĉiam devas humile konfesi niajn pekojn antaŭ Dio, tamen ni devas tion fari precipe, kiam ni kolektiĝas kaj kunvenas por lin danki pro la grandaj bonfaroj, kiujn ni ricevis el liaj manoj, por inde lin laŭdi, poraŭdi liansanktan vorton, kaj por peti ĉion, kio estas bezona kaj necesa ne nur por la korpo sed ankaŭ por la animo. Pro tio mi petas kaj petegas, ke vi, apudstarantaj, akompanu min kun pura koro kaj humila voĉo al la trono de la ĉiela graco, dirante post mi:

### ¶ Komuna konfeso

*Kiun devas ripeti la tuta kunvenintaro post la pastro, dum ĉiuj genuas.*

**Ĉ**IOPOVA kaj plej kompatema Patro, ni craris kaj vagis for de viaj vojoj kiel perditaj ŝafoj. Ni sekvis tro multe la elpensojn kaj dezirojn de niaj propraj koroj. Ni pekis kontraŭ viaj sanktaj leĝoj. Ni lasis nefarita tion, kion ni devas fari; kaj ni faris tion, kion ni devas ne fari:

kaj en ni ne estas sano. Tamen vi, Sinjoro, kompatu nin, kompatindajn pekulojn. Indulgu tiujn, Dio, kiuj konfesas siajn kulpojn. Remetu en vian favoron la pentintojn, laŭ viaj promesoj anoncitaj al la homaro en Kristo Jesuo nia Sinjoro; kaj donu, plej kompatema Patro, pro li, ke ni de nun pasigu la vivon pie, juste kaj serioze, al la gloro de via sankta nomo. Amen.

### ¶ La absolvon, aŭ formeton de pekoj,

*Anoncu sola la presbitero starante, dum ĉiuj ankoraŭ genuas.*

**Ĉ**IOPOVA Dio, la Patro de nia Sinjoro Jesuo Kristo, kiu ne volas la morton de pekulo, sed volas prefere, ke li sin turnu for de sia malvirteco kaj vivu; kaj donis aŭtoritaton kaj ordonon al siaj presbiteroj deklari kaj anonci al lia popolo, se ĝi pentos, la absolvon kaj formeton de iliaj pekoj: li pardonas kaj absolvas ĉiun, kiu vere pentas kaj sincere kredas lian sanktan evangelion. Tial ni petegu lin, ke li donu al ni veran penton kaj sian Sanktan Spiriton, por ke tio, kion ni nun faras, plaĉu al li, kaj la resto de nia vivo de nun estu pura kaj sankta: tiel

ke ni fine atingu lian eternan ĝojon pere de Jesuo Kristo nia Sinjoro.

¶ *Oni respondu ĉi tie, kaj en la fino de ĉiu alia preĝo, Amen.*

¶ *Tiam la pastro genuu kaj diru laŭtvoĉe la preĝon de la Sinjoro, dum oni ankoraŭ genuas kaj ripetas ĝin post li, ĉi tie kaj kie ajn ĝi estos uzata en la Diservo.*

**P**ATRO nia, kiu estas en la ĉielo: via nomo estu sanktigita: via regno venu: via volo estu farita, kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero: nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ: kaj formetu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni formetas al niaj ŝuldantoj: kaj ne konduku nin en tenton, sed liberigu nin de la malbona: ĉar viaj estas la regado, la potenco, kaj la gloro, eterne. Amen.

¶ *Tiam sammaniere li diru, Sinjoro, malfermu niajn lipojn.*

*Respondo.* Kaj nia buŝo deklaras vian laŭdon.

*Presbitero.* Dio, rapidu nin savi.

*Respondo.* Sinjoro, ne prokrastu nin helpi.

¶ *Ĉi tie ĉiuj stariĝu, kaj la presbitero diru,*

Gloro al la Patro, kaj al la Filo: kaj al la Spirito Sankta;

*Respondo.* kiel estis en

la komenco, nun estas: kaj estos ĉiam, eterne. Amen.

*Presbitero.* Laŭdu la Sinjoron.

*Respondo.* La nomo de la Sinjoro estu laŭdata.

¶ *Tiam oni diru aŭ kantu jenun psalmon: sed ne en Pasko, por kiu alia antemo estas ordonita; kaj je la deknaŭa tago ĉiumonate ĝi ne devas esti legata ĉi tie, sed en la kutima vico de la psalmoj.*

VENITE, EXULTEMUS  
DOMINO.

Psalmo 95.

**V**ENU, ni kantos al Dio, ni ĝoje krios al la rifuĝejo de nia helpo.

Ni venu antaŭ lian vizaĝon kun glorado, per psalmoj ni ĝoje krios al li.

Ĉar granda Dio estas la Eternulo kaj granda reĝo super ĉiuj dioj,

kiu havas en sia mano la profundaĵojn de la tero, kaj al kiu apartenas la altaĵoj de la montoj;

al kiu apartenas la maro, kaj li ĝin faris, kaj la sekteron liaj manoj kreis.

Venu, ni kliniĝos, ni jetos nin teren, ni genuos antaŭ Dio, nia kreinto.

Ĉar li estas nia Dio kaj ni estas la popolo de lia paŝtejo kaj la ŝafoj de lia mano,

nun, se vi aŭskultas lian voĉon. Ne obstinigu vian koron, kiel en Meribo, kiel

MATENA PRĜO.

en la tago de tento en la dezerto,

kiam viaj patroj min tentis, esploris kaj vidis mian faron.

Kvardek jarojn mi indignis kontraŭ tiu generacio, kaj mi diris: ili estas popolo kun koro malĝusta, kaj ili ne volas koni miajn vojojn, tial mi juris en mia kolero, ke ili ne venos en mian ripozejon.

Gloro al la Patro, kaj al la Filo: kaj al la Spirito Sankta;

kiel estis en la komenco, nun estas: kaj estos ĉiam, eterne. Amen.

¶ *Tiam sekvu la psalmojn en la ordo, kiel estas difinite. Ĉiufoje dum la jaro je la fino de psalmo, kaj same je la fino de Benedicte, Benedictus, Magnificat, kaj Nunc Dimittis, estu ripetata jene:*

Gloro al la Patro, kaj al la Filo: kaj al la Spirito Sankta;

*Respondo.* kiel estis en la komenco, nun estas: kaj estos ĉiam, eterne. Amen.

¶ *Tiam estu legata larŭvoĉe la unua legaĵo elĉerpita el la Malnova Testamento, kiel estas difinite en la Kalendaro; sed ne kiam estas propraj prelegoj difinitaj al tiu tago: la leganto tiel staru, kiel li povas plej bone esti aŭdata de ĉiu ĉeestanto. Poste oni diru aŭ kantu en la komuna lingvo la himnon nomatan Te Deum laudamus, ĉiutage tra la jaro.*

¶ *Notu, ke antaŭ ĉiu legaĵo la leganto diru: Ĉi tie komenciĝas tia ĉapitro, aŭ tia paragrafero el tia ĉapitro, el tia libro; ankaŭ post ĉiu legaĵo: Ĉi tie finiĝas la unua, aŭ la dua, legaĵo.*

TE DEUM LAUDAMUS.

**N**I laŭdas vin Dion; ni konfesas vin la Sinjoro.

Vin la eternan Patron: la tuta tero adoras.

Al vi ĉiuj anĝeloj: la ĉieloj kaj ĉiuj potencoj tieaj.

Al vi keruboj kaj serafoj: senĉese krias:

Sankta, Sankta, Sankta: Dio Cebaot;

Ĉielo kaj tero estas plenaj je la majesto de via gloro.

La glora ĥoro de la apostoloj: laŭdas vin.

La laŭdinda anaro de la profetoj: laŭdas vin.

La blankvestita armeo de la martiroj: laŭdas vin.

La sankta eklezio tra la tuta mondo: konfesas vin;

la Patron: senliman je majesto;

vian adorindan, veran; kaj solan Filon;

ankaŭ la Sanktan Spiriton: la Parakliton.

Vi estas la Reĝo de gloro: Kristo.

Vi estas la eterna Filo: de la Patro.

Vi, homiĝante por liberigi la homaron: ne malestimis la virgulinan uteron.

## MATENA PREGO.

Vi, venkinte la pikilon de la morto: malfermis la Regnon de la Ĉielo al ĉiuj kredantoj.

Vi sidas dekstre de Dio: en la gloro de la Patro.

Ni kredas, ke vi venos: por esti nia juĝanto.

Vin do ni petas, helpu viajn servantojn: kiujn vi elaĉetis per via altvalora sango.

Igu ilin ennombrigi en vian sanktularon: en gloro eterna.

Sinjoro, savu vian popolon: kaj benu vian heredaĵon.

Regu ilin: kaj levu ilin ĝis la eterneco.

Tagon post tago: ni benas vin;

kaj ni laŭdas vian nomon: je la eterneco.

Bonvolu, Sinjoro: konservi nin hodiaŭ sen peko.

Kompatu nin, Sinjoro: kompatu nin.

Estusurni via kompateco: kiel nia konfido estas en vi.

En vi, Sinjoro, mi konfidas: ne lasu min por ĉiam esti konsternita.

¶ *Aŭ ĉi tiun himnon.*

BENEDICITE, OMNIA  
OPERA.

**B**ENU, ĉiuj faritaĵoj de la Sinjoro, la Sinjoron: lin laŭdu kaj gloru eterne.

Benu, anĝeloj de la Sin-

joro, la Sinjoron: lin laŭdu kaj gloru eterne.

Benu, ĉielo, la Sinjoron: lin laŭdu kaj gloru eterne.

Benu, akvoj, kiuj estas super la firmaĵo, la Sinjoron: lin laŭdu kaj gloru eterne.

Benu, ĉiuj aŭtoritatoj de la Sinjoro, la Sinjoron: lin laŭdu kaj gloru eterne.

Benu, suno kaj luno, la Sinjoron: lin laŭdu kaj gloru eterne.

Benu, steloj ĉielaj, la Sinjoron: lin laŭdu kaj gloru eterne.

Benu, ekpluvoj kaj roso, la Sinjoron: lin laŭdu kaj gloru eterne.

Benu, ventoj de Dio, la Sinjoron: lin laŭdu kaj gloru eterne.

Benu, fajro kaj varmego, la Sinjoron: lin laŭdu kaj gloru eterne.

Benu, vintro kaj somero, la Sinjoron: lin laŭdu kaj gloru eterne.

Benu, rosoj kaj frostoj, la Sinjoron: lin laŭdu kaj gloru eterne.

Benu, frostoj kaj malvarmo, la Sinjoron: lin laŭdu kaj gloru eterne.

Benu, glacio kaj neĝo, la Sinjoron: lin laŭdu kaj gloru eterne.

Benu, noktoj kaj tagoj, la Sinjoron: lin laŭdu kaj gloru eterne.

## MATENA PREĜO.

Benu, lumoj kaj mallumo,  
la Sinjoron : lin laŭdu kaj  
gloru eterne.

Benu, fulmoj kaj nuboj,  
la Sinjoron : lin laŭdu kaj  
gloru eterne.

Benu, tero, la Sinjoron :  
vere, lin laŭdu kaj gloru  
eterne.

Benu, montoj kaj monte-  
toj, la Sinjoron : lin laŭdu  
kaj gloru eterne.

Benu, ĉiuj vegetaĵoj sur  
la tero, la Sinjoron : lin  
laŭdu kaj gloru eterne.

Benu, fontoj, la Sinjoron :  
lin laŭdu kaj gloru eterne.

Benu, maroj kaj fluantaj  
akvoj, la Sinjoron : lin  
laŭdu kaj gloru eterne.

Benu, balenoj kaj ĉiu  
vivaĵo trafranta la akvojn,  
la Sinjoron : lin laŭdu kaj  
gloru eterne.

Benu, ĉiuj birdoj de la  
ĉielo, la Sinjoron : lin laŭdu  
kaj gloru eterne.

Benu, ĉiuj bestoj kaj  
brutoj, la Sinjoron : lin  
laŭdu kaj gloru eterne.

Benu, homidoj, la Sin-  
joron : lin laŭdu kaj gloru  
eterne.

Benu, Izrael, la Sinjoron :  
lin laŭdu kaj gloru eterne.

Benu, oferistoj de la Eter-  
nulo, la Sinjoron : lin laŭdu  
kaj gloru eterne.

Benu, servantoj de la  
Eternulo, la Sinjoron : lin  
laŭdu kaj gloru eterne.

Benu, spiritoj kaj animoj  
de la justuloj, la Sinjoron :  
lin laŭdu kaj gloru eterne.

Benu, vi, homoj sanktaj  
kaj korhumilaj, la Sinjoron :  
lin laŭdu kaj gloru eterne.

Benu, Ananiah, Azariah,  
kaj Misael, la Sinjoron : lin  
laŭdu kaj gloru eterne.

Gloro al la Patro, kaj al  
la Filo : kaj al la Spirito  
Sankta ;

kiel estis en la komenco,  
nun estas : kaj estos ĉiam,  
eterne. Amen.

¶ *Tiam estu legata sammaniere  
la duaj legaĵoj elĉerpitu el la  
Nova Testamento. Poste jena  
himno sekvu, sed ne se okazos,  
ke ĝi estos legata en la taga  
ĉapitro, aŭ por la evangelio je  
la tago de S.ta. Johano la  
Baptisto.*

## BENEDICTUS.

Sta. Luko 1. 68.

**B**ENATA estu la Sin-  
joro, la Dio de Izrael :  
ĉar li vizitis sian popolon  
kaj faris por ili elĉaĉeton ;

kaj levis kornon de savo  
por ni : en la domo de sia  
servanto David :

kiel li parolis per la buŝo  
de siaj sanktaj profetoj : de  
la komenco de la mondo ;

savadon el niaj malami-  
koj : kaj el la manoj de ĉiuj  
malamantaj nin ;

por montri sian bonecon  
ĉe niaj patroj : kaj por

## MATENA PREGO.

memori sian sanktan interligon ;

la furon, kiun li ĵuris al Abraham nia patro : ke li donacos al ni,

ke, liberigite el mano de niaj malamikoj : ni servu lin sentine ;

en sankteco kaj justeco antaŭ li : ĉiujn niajn tagojn.

Kaj vi, infano, estos nomata profeto de la Plejaltulo : ĉar vi antaŭiros antaŭ la vizaĝo de la Sinjoro por protigi liajn vojojn ;

por doni scion de savado al lia popolo : en la pardono de iliaj pekoj,

pro la kompata koro de nia Dio : per kiu la sunleviĝo de supre vizitis nin ;

por lumi sur tiujn, kiuj sidas en la mallumo kaj en la ombro de morto : por gvidi niajn piedojn en la vojon de la paco.

Gloro al la Patro, kaj al la Filo : kaj al la Spirito Sankta ;

kiel estis en la komenco, nun estas : kaj estos ĉiam, eterne. Amen.

¶ *Aŭ ĉi tiun psalmon.*

JUBILATE DEO.

Psalmo 100.

**G**OJE krii al Dio la tuta tero : servu al Dio kun ĝojo, venu antaŭ lian vizaĝon kun kanto.

Sciu, ke la Eternulo estas

Dio : li nin kreis, kaj al li ni apartenas, lia popolo kaj ŝafoj de lia paŝtejo.

Eniru en liajn pordegojn kun glorado, en liajn kortojn kun laŭdado : gloru lin, benu lian nomon.

Ĉar Dio estas bona, lia favorkoreco estas eterna : kaj de generacio al generacio daŭras lia fideleco.

Gloro al la Patro, kaj al la Filo : kaj al la Spirito Sankta ;

kiel estis en la komenco, nun estas : kaj estos ĉiam, eterne. Amen.

† *Tiam estu kantata aŭ dirata de la presbilero kaj la ĉeestantoj starantaj la Apostola Kredaĵo : krom tiujn tagojn kiam estas ordonite, ke la kredaĵo de Sankta Atanasio estu legata.*

**M**I kredas je Dio la Patro ĉiopova, la kreinto de la ĉielo kaj la tero :

Kaj je Jesuo Kristo, lia sola Filo, nia Sinjoro : kiu estis embriigita pere de la Sankta Spirito : naskita de la Virgulino Mario : suferis sub Pontio Pilato : estis krucumita, mortis, estis entombigita : malsupreniris en inferon : la trian tagon li releviĝis el la mortintoj : li supreniris en la ĉielon, kaj sidas dekstre de Dio la Patro ĉiopova : de tie li revenos por juĝi la vivantojn kaj la mortintojn.



MATENA PREĜO.

Mi kredas je la Sankta Spirito: la sankta eklezio katolika: la komunumo de la sanktuloj: la pardono de pekoj: la relevigo de la korpo: kaj la vivo eterna. Amen.

¶ *Post tio, ĉi tiuj preĝoj sekvu, dum ĉiuj pie genuas: la pastro antaŭe eldiru laŭvoĉe:*

La Sinjoro estu kun vi.

*Respondo.* Kaj kun via spirito.

*Pastro.* Ni preĝu.

Sinjoro, kompatu nin.

*Kristo, kompatu nin.*

Sinjoro, kompatu nin.

¶ *Tiam la pastro, klerikoj, kaj la aliaj diru laŭvoĉe, la preĝon de la Sinjoro.*

**P**ATRO nia, kiu estas en la ĉielo: vianomo estu sanktigita: via regno venu: via volo estu farita, kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero: nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ: kaj formetu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni formetas al niaj ŝuldantoj: kaj ne konduku nin en tenton, sed liberigu nin de la malbona. Amen.

¶ *Tiam la presbitero, stariginte, diru:*

Sinjoro, montru al ni vian kompaton:

*Respondo.* kaj donacu al ni vian savon.

*Presbitero.* Sinjoro, gardu la reĝon:

*Respondo.* kaj kompate aŭdu, kiam ni preĝas al vi.

*Presbitero.* Vestu viajn presbiterojn per justeco:

*Respondo.* kaj ĝojigu vian elektitojn.

*Presbitero.* Sinjoro, gardu vian popolon:

*Respondo.* kaj henu vian heredaĵon.

*Presbitero.* Donu pacon en nia tempo, Sinjoro:

*Respondo.* ĉar neniu alia batalas pro ni, krom vi sola, Dio.

*Presbitero.* Dio, purigu en ni niajn korojn:

*Respondo.* kaj ne forprenu de ni vian Sanktan Spiriton.

¶ *Tiam sekvu tri resumpreĝoj: la unua de la tago, kiu estos tiu sama, kiu estas difinita por la Komunio: la dua por la paco: la tria por la graco por vivi bone. Plie, la du lastaj resumpreĝoj neniam estu ŝanĝitaj, sed estu dirataj en Matena Preĝo ĉiutage tra la tuta jaro, kiel sekvas: ĉiuj genuu.*

*La dua resumpreĝo por la paco.*

**D**IO, kiu estas la Estiginto de la paco, kaj la amanto de la konkordo, kiun koni estas nia eterna vivo, kiun servadi estas perfekta libereco: defendu nin viajn humilajn servantojn kontraŭ ĉiuj atakoj de niaj malamikoj: por ke ni, certe fidante vian defendon, ne

## MATENA PREĜO.

timu la forton de niaj kontraŭbatalantoj, pere de la potenco de Jesuo Kristo nia Sinjoro. *Amen.*

*La tria resumpreĝo por la graco.*

**S**INJORO, nia ĉiela Patro, Dio ĉiopova kaj eterna, kiu konservis nin ĝis la komenco de ĉi tiu tago: protektu nin ĉi tiun tagon per via forta potenco; kaj donu, ke hodiaŭ ni nek falu en ian pekon, nek kuru en ian danĝeron: sed ke ĉiuj niaj faroj estu ordonataj per via gvido. por ke ni faru tion, kio estas justa antaŭ vi: pere de Jesuo Kristo nia Sinjoro. *Amen.*

¶ *En ĥorejoj kaj lokoj, kie oni kantas, nun sekvi la anteno.*

¶ *Tiam jenaj kvin preĝoj sekvan-taj estu legataj ĉi tie, sed ne kiam la Litanio estos legata, kaj tiam nur la lasta duoj estu legata, kiel ili havas lokon malsupre.*

*Preĝo por lia reĝa moŝto.*

**S**INJORO, nia ĉiela Patro, alta kaj potenco, Reĝo super reĝoj, Sinjoro super sinjoroj, la sola Reganto de princoj, kiu de via trono rigardas ĉiujn loĝantojn sur la tero: tre kore ni petegas vin laŭ via favoro rigardi nian plej bonvolan regnestran sinjoron, la reĝon *GEORGON*; kaj tiamaniere lin replenigu

je la graco de via Sankta Spirito, por ke li ĉiam sin klinu al via volo, kaj iru en viaj vojoj: plenigu lin abunde je viaj ĉielaj donacoj: donu al li vivdaŭron en sano kaj prospero: fortigu lin, por ke li venku ĉiun malamikon sian, kaj fine post ĉi tiu vivo li atingu eternan ĝojon kaj feliĉecon pere de Jesuo Kristo nia Sinjoro. *Amen.*

*Preĝo por la reĝa familio.*

**Ĉ**IOPOVA Dio, la Fonto de ĉia boneco. ni humile vin petegas beninian bonvolan reĝinon Marion, Aleksandrinon la reĝan patrinon, Eduardon la princon de Kimrujo, kaj la tutan reĝan familion: plenigu ilin je via Sankta Spirito: riĉigu ilin je via ĉiela graco: prosperigu ilin donante al ili ĉian feliĉigaĵon: kaj konduku ilin al via eterna regno: pere de Jesuo Kristo nia Sinjoro. *Amen.*

*Preĝo por la pastraro kaj la laikaro.*

**Ĉ**IOPOVA kaj eterna Dio, kiu sola faras grandajn miraklojn, sendu sur niajn episkopojn kaj parohiestrojn, kaj sur ĉiujn kristanarojn alkonfidaĵajn al ilia zorgado, la sanigan Spiriton de via graco: Plie, por ke ili vere plaĉu al vi,

MATENA PREĜO.

elverŝu sur ilin la roson de  
via daŭra beno : donu tion,  
Sinjoro, je la honoro de nia  
Advokato kaj Perulo, Jesuo  
Kristo. *Amen.*

*Preĝo de Sta. Krisostom.*

**C**IOPOVA Dio, kiu nin  
permesas nuntempe  
fari al vi niajn komunajn  
preĝojn unuanime, kaj pro-  
mesas, ke kiam du aŭ tri  
estas kunvenintaj en via  
nomo, vi plenumos iliajn

petojn : plenumu nun la  
dezirojn kaj petojn de viaj  
servantoj, kiel estos plej  
oportune por ili, donante al  
ni en ĉi tiu mondaĝo la  
sciadon pri via vero, kaj en  
la estonta mondo vivon  
eternan. *Amen.*

2 Kor. 13.

**L**A graco de nia Sinjoro  
Jesuo Kristo, kaj la  
amo de Dio, kaj la kuneco  
de la Sankta Spirito, estu  
kun ni ĉiuj por ĉiam. *Amen.*

*Jen finiĝas la ordo por Matena Preĝo ĉiufoje dum la jaro.*

# LA ORDO DE VESPERA PREGO,

CIUTAGE DUM LA JARO.

¶ *Je la komenco de Vespera Preĝo la pastro legu laŭvoĉe unu aŭ plii el ĉi tiuj frazoj el la Skribo, kiuj sekvas. Poste li diru tion, kio estas skribita post tiuj frazoj.*

**K**IAM la malpiulo sin turnas for de siaj malbonfaritaĵoj, kaj agos laŭleĝe kaj juste, li konservos la animon.—*Ezek. 18. 27.*

Miajn kulpojn mi konscias kaj mia peko estas ĉiam antaŭ mi.—*Ps. 51. 3.*

Kaŝu vian vizaĝon de miaj pekoj kaj ĉiujn miajn krimojn elstreku.—*Ps. 51. 9.*

Oferdonoj al Dio estas spirito suferanta: koron suferantan kaj humilan vi, Dio, ne malŝatas.—*Ps. 51. 17.*

Vian koron kaj ne viajn vestojn disŝiru, kaj turnu vin al la Eternulo, via Dio: ĉar li estas favorkora kaj kompatema, longetolerema kaj tre bona, kaj pentanta pri la malbono.—*Joel 2. 13.*

Al la Sinjoro, nia Dio, apartenas kompatoj kaj pardonoj, kvankam ni ribelis kontraŭ li: nek obeis ni la voĉon de la Eternulo, nia Dio, ke ni sekvu lian instruon, kiun li donis al ni.—*Dan. 9. 9, 10.*

Eternulo, punu min, sed

justece; ne en via kolero, por ke vi ne neniigu min.—*Jer. 10. 24; Ps. 6. 1.*

Pentu, ĉar alproksimiĝas la regno de la ĉielo.—*Sta. Mat. 3. 2.*

Mi leviĝos kaj iros al mia patro kaj diros al li: Patro, mi pekis kontraŭ la ĉielo kaj antaŭ vi, kaj mi jam ne indas esti nomata via filo.—*Sta. Luko 15. 18, 19.*

Ne eniru en juĝon kun via sklavo, ĉar nenio vivanta povos praviĝi antaŭ vi.—*Ps. 143. 2.*

Se ni diras, ke pekon ni ne havas, ni nin trompas, kaj la vero ne estas en ni: sed, se ni konfesas niajn pekojn, li estas fidela kaj justa por pardoni al ni la pekojn kaj nin purigi de ĉia maljusteco.—*I Epis. de Sta. Joh. 1. 8, 9.*

**K**ORE amataj gefratoj, en diversaj lokoj la Skribo nin instigas konscii kaj konfesi niajn multspecajn pekojn kaj malbonecon, kaj ne prihipo-

## VESPERA PREĜO.

kriti kaj kaŝi ilin antaŭ la ĉiopova Dio, nia ĉiela Patro; sed, ke ni ilin konfesu el koro humila, modesta, penta, kaj obeema; por ke ni ricevu pardonon pri ili laŭ lia senlima boneco kaj kompato. Plie, kvankam ni ĉiam devas humile konfesi niajn pekojn antaŭ Dio, tamen ni devas tion fari precipe, kiam ni kolektiĝas kaj kunvenas por lin danki pro la grandaj bonfaroj, kiujn ni ricevis el liaj manoj, por inde lin laŭdi, por aŭdi lian sanktan vorton, kaj por peti ĉion, kio estas bezona kaj necesa ne nur por la korpo sed ankaŭ por la animo. Pro tio mi petas kaj petegas, ke vi, apudstarantaj, akompanu min kun pura koro kaj humila voĉo al la trono de la ĉiela graco, dirante post mi:

### ¶ Komuna konfeso

*Ordonita esti dirata de la tuta kunvenintaro post la pastro, dum ĉiuj genuas.*

**ĈIOPOVA** kaj plej kompatema Patro, ni eraris kaj vagis for de viaj vojoj, kiel perditaj ŝafoj. Ni sekvis tro multe la elpensojn kaj dezirojn de niaj propraj koroj. Ni pekis kontraŭ viaj sanktaj leĝoj. Ni lasis nefarita tion, kion ni devas fari; kaj ni faris tion, kion ni devas ne fari;

kaj en ni ne estas sano. Tamen vi, Sinjoro, kompatu nin, kompatindajn pekulojn. Indulgu tiujn, Dio, kiuj konfesas siajn kulpojn. Remetu en vian favoron la pentintojn, laŭ viaj promesoj anoncitaj al la homaro en Kristo Jesuo nia Sinjoro; kaj donu, plej kompatema Patro, pro li, ke ni de nun pasigu la vivon pie, juste kaj serioze, al la gloro de via sankta nomo. Amen.

### ¶ La absolvon, aŭ formeton de pekoj,

*Anoncu sola la presbitero starante dum ĉiuj ankoraŭ genuas.*

**ĈIOPOVA** Dio, la Patro de nia Sinjoro Jesuo Kristo, kiu ne volas la morton de pekulo, sed volas prefere, ke li sin turnu for de sia malvirteco kaj vivu; kaj donis aŭtoritaton kaj ordonon al siaj presbiteroj deklari kaj anonci al lia popolo, se ĝi pentos, la absolvon kaj formeton de iliaj pekoj: li pardonas kaj absolvas ĉiun, kiu vere pentas kaj sincere kredas lian sanktan evangelion. Tial ni petegu lin, ke li donu al ni veran penton kaj sian Sanktan Spiriton, por ke tio, kion ni nun faras, plaĉu al li, kaj la resto de nia vivo de nun estu pura kaj sankta:

VESPERA PREGO.

tiel ke ni fine atingu lian eternan ĝojon pere de Jesuo Kristo nia Sinjoro. Amen.

¶ *Tiam la pastro genuu, kaj diru la preĝon de la Sinjoro: la ĉeestantoj, ankaŭ genuante, ripetu ĝin kun li.*

**P**ATRO nia, kiu estas en la ĉielo: via nomo estu sanktigita: via regno venu: via volo estu farita, kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero: nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ: kaj formetu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni formetas al niaj ŝuldantoj: kaj ne konduku nin en tenton, sed liberigu nin de la malbona: ĉar viaj estas la regado, la potenco, kaj la gloro, eterne. Amen.

¶ *Tiam same li diru,*

Sinjoro, malfermu niajn lipojn.

*Respondo.* Kaj nia buŝo deklaras vian laŭdon.

*Presbitero.* Dio, rapidu nin savi.

*Respondo.* Sinjoro, neprokrastu nin helpi.

¶ *Ĉi tie ĉiuj stariĝu, kaj la presbitero diru.*

Gloro al la Patro, kaj al la Filo: kaj al la Spirito Sankta;

*Respondo.* kiel estis en la komenco, nun estas: kaj estos ĉiam, eterne. Amen.

*Presbitero.* Laŭdu la Sinjoron.

*Respondo.* La nomo de la Sinjoro estu laŭdata.

¶ *Tiam oni diru aŭ kantu la psalmojn en la ordo, kiel estas difinite. Tiam sekvas legaĵo el la Malnova Testamento, kiel estas difinite; kaj poste Magnificat (aŭ la kanto de la benata Virgolino Mario) en la komuna lingvo, jene:*

MAGNIFICAT.

Sta. Luko 1.

**M**IA animo altigas la Sinjoron: kaj mia spirito ĝojis en Dio mia Savanto, ĉar li rigardis: la humilecon de sia servistino.

Ĉar, jen, de nun: ĉiuj generacioj nomos min feliĉa.

Ĉar la Potenculo faris al mi grandaĵojn: kaj sankta estas lia nomo;

kaj lia boneco estas por ĉiuj generacioj: sur la timantaj lin.

Li montris forton per sia brako: li dispelis ficrulojn en la penso de ilia koro.

Li malaltigis potenculojn de iliaj tronoj: kaj altigis humilulojn.

Malsatulojn li plenigis je bonaĵo: kaj riĉulojn li forsendis malplenaĵ.

Li helpis Izraelon sian servanton, memorante kompacecon: kiel li parolis al niaj patroj, al Abraham kaj al lia idaro eterne.

Gloro al la Patro, kaj al la Filo: kaj al la Spirito Sankta;

VESPERA PREĜO.

kiel estis en la komenco,  
nun estas: kaj estos ĉiam,  
eterne. Amen.

¶ *Aŭ ĉi tiun psalmon; sed ne en la deknaŭa de la monato, kiam oni legas ĝin en la ordinara vico de la psalmoj.*

CANTATE DOMINO.

Psalmo 98.

**K**ANTU al Dio novan kanton: ĉar miraklojn li faris.

Helpis lin lia dekstremano: kaj lia sankta brako.

Dio aperigis sian helpon: antaŭ la okuloj de la popoloj li malkaŝis sian justecon.

Li memoras sian bonecon kaj fidelecon al la domo de Izraelo: Vidis ĉiuj finoj de la tero la helpon de nia Dio.

Ĝoje krii al Dio la tuta tero: kantu, gloru kaj muziku.

Muziku al Dio per harpo: per harpo kaj per sonoj de psalmo.

Per trumpetoj kaj per sono de korno: ĝoje krii antaŭ la reĝo Dio.

Bruu la maro kaj ĉio, kio ĝin plenigas: la mondo kaj ĝiaj loĝantoj.

La riveroj plaŭdu per la manoj, la montoj ĉiuj kantu antaŭ Dio: ĉar li venas, por juĝi la teron.

Li juĝos la mondon kun justeco: kaj la popolojn kun vereco.

Gloro al la Patro, kaj al

la Filo: kaj al la Spirito Sankta;

kiel estis en la komenco, nun estas: kaj estos ĉiam, eterne. Amen.

¶ *Tiam legaĵon el la Nova Testamento, kiel estas difinite. Poste Nunc Dimittis (aŭ la kanton de Simeon) en la komuna lingvo, jene:*

NUNC DIMITTIS.

Sta. Luko 2. 29.

**N**UN, ho Sinjoro, vi ellas vian servanton: laŭ via vorto, en paco.

Ĉar miaj okuloj vidis: vian savon,

kiun vi preparis: antaŭ la vizaĝo de ĉiuj popoloj:

lumon por malkaŝo al la gentoj: kaj ĝloron de via popolo Izrael.

Gloro al la Patro, kaj al la Filo: kaj al la Spirito Sankta;

kiel estis en la komenco, nun estas: kaj estos ĉiam, eterne. Amen.

¶ *Aŭ ĉi tiun psalmon: sed ne en la dekdua de la monato.*

DEUS MISEREA TUR.

Psalmo 67.

**D**IO nin korfavoru kaj benu: li aperigu al ni sian luman vizaĝon.

Oni ekkonu sur la tero vian vojon: en ĉiuj popoloj vian savon.

Dankos vin popoloj, ho Dio: dankos vin ĉiuj popoloj.

VESPERA PREĜO.

Gojos kaj kantos gentoj :  
ĉar vi juĝas popolojn juste  
kaj gentojn sur la tero vi  
regas.

Dankos vin popoloj, ho  
Dio : dankos vin ĉiuj  
popoloj.

La tero donis sian fruk-  
ton : benu nin Dio, nia Dio.

Benu nin Dio : kaj re-  
spektu lin ĉiuj limoj de la  
tero.

Gloro al la Patro, kaj al  
la Filo : kaj al la Spirito  
Sankta ;

kiel estis en la komenco,  
nun estas : kaj estos ĉiam,  
eterne. Amen.

¶ *Tiam estu dirata aŭ kantata la  
Apostola Kredaĵo de la pastro,  
kaj ĉiuj aliaj, starantaj.*

**M**I kredas je Dio la Patro  
ĉiopova, la kreinto  
de la ĉielo kaj de la tero :

Kaj je Jesuo Kristo, lia  
sola Filo, nia Sinjoro : kiu  
estis embriigita pere de la  
Sankta Spirito : naskita de  
la Virgulino Mario : suferis  
sub Pontio Pilato : estis  
kruĉumita, mortis, estis en-  
tombigita : malsupreniris en  
inferon : la trian tagon li  
releviĝis el la mortintoj : li  
supreniris en la ĉielon, kaj  
sidas dekstre de Dio la Patro  
ĉiopova : de tie li revenos  
por juĝi la vivantojn kaj la  
mortintojn.

Mi kredas je la Sankta  
Spirito : la sankta eklezio

katolika : la komunumo de  
la sanktuloj : la pardono de  
pekoj : la relevigo de la  
korpo : kaj la vivo eterna.  
Amen.

¶ *Post tio, ĉi tiuj preĝoj seknu,  
dum ĉiuj pie genuas : la pastro  
antaŭe eldiru laŭvoĉe :*

La Sinjoro estu kun vi.

*Respondo.* Kaj kun via  
spirito.

*Pastro.* Ni preĝu.

Sinjoro, kompatu nin.

*Kristo, kompatu nin.*

Sinjoro, kompatu nin.

¶ *Tiam la pastro, klerikoj kaj  
popolo diru laŭvoĉe la preĝon  
de la Sinjoro.*

**P**ATRO nia, kiu estas  
en la ĉielo : via nomo  
estu sanktigita : via regno  
venu : via volo estu farita,  
kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ  
sur la tero : nian panon  
ĉiutagan donu al ni hodiaŭ,  
kaj formetu al ni niajn ŝul-  
dojn, kiel ankaŭ ni formetas  
al niaj ŝuldantoj : kaj ne  
konduku nin en tenton, sed  
liberigu nin de la malbona.  
Amen.

¶ *Tiam la presbitero, stariĝinte,  
diru,*

Sinjoro, montru al ni vian  
kompaton :

*Respondo.* kaj donacu  
al ni vian savon.

*Presbitero.* Sinjoro, gardu  
la reĝon :

*Respondo.* kaj kompate  
aŭdu, kiam ni preĝas al vi.



VESPERA PREĜO.

*Presbitero.* Vestu viajn presbiterojn per justeco :

*Respondo.* kaj ĝojigu vian elektitojn.

*Presbitero.* Sinjoro, gardu vian popolon :

*Respondo.* kaj benu vian heredaĵon.

*Presbitero.* Donu pacon en nia tempo, Sinjoro :

*Respondo.* ĉar neniu alia batalas pro ni, krom vi sola, Dio.

*Presbitero.* Dio, purigu en ni niajn korojn :

*Respondo.* kaj ne forprenu de ni vian Sanktan Spiriton.

¶ *Tiam sekvu tri resumpreĝoj :*  
*la unua de la tago, la dua por la paco, la tria por helpo kontraŭ ĉiaj danĝeroj, kiel ĉi tie sekvas. La lasta duo da resumpreĝoj estu ĉiutage dirata ĉe Vespera Preĝo sen sánĝo.*

*La dua resumpreĝo ĉe Vespera Preĝo.*

**D**IO, de kiu devenas ĉiu sankta deziro, ĉiu bona konsilo, kaj ĉiu agado justa; donu al viaj servantoj tiun pacon, kiun la mondo ne povas doni; por ke ni tutkore celu viajn ordonojn obei, kaj por ke ni, de vi defendate kontraŭ timo antaŭ niaj malamikoj, travivu nian tempon kviete kaj trankvile; per la meritoj de Jesuo Kristo nia Savanto. *Amen.*

*La tria resumpreĝo, por helpo kontraŭ ĉiaj danĝeroj.*

**L**UMU, ni petegas vin, Sinjoro, en nian mallumon; kaj laŭ via granda kompatato defendu nin kontraŭ ĉiu insido kaj danĝero de la nokto venonta; pro la amo de via sola filo, nia Savanto, Jesuo Kristo. *Amen.*

¶ *En ĥorejoj kaj lokoj, kie oni kantas, nun sekvu la antemo.*

*Preĝo por lia reĝa moŝto.*

**S**INJORO, nia ĉiela Patro, alta kaj potenca, Reĝo super reĝoj, Sinjoro super sinjoroj, la sola Reganto de princoj, kiu de via trono rigardas ĉiujn loĝantojn sur la tero: tre kore ni petegas vin laŭ via favoro rigardi nian plej bonvolan regnestran sinjoron, la reĝon *GEORGON*; kaj tiamaniere lin replenigu je la graco de via Sankta Spirito, por ke li ĉiam sin klinu al via volo, kaj iru en viaj vojoj: plenu lin abunde je viaj ĉielaj donacoj: donu al li vivdaŭron en sanokaj prospero: fortigu lin, por ke li venku ĉiun malamikon sian, kaj fine post ĉi tiu vivo li atingu eternan ĝojon kaj feliĉecon pere de Jesuo Kristo nia Sinjoro. *Amen.*

VESPERA PREĜO.

*Preĝo por la reĝa familio.*

**Ĉ**I OPOVA Dio, la Fonto de ĉia boneco, ni humile vin petegas beni nian bonvolan reĝinon Marion, Aleksandrion la reĝan patrinon, Eduardon la princon de Kimrujo, kaj la tutan reĝan familion: plenigu ilin je via Sankta Spirito: riĉigu ilin je via ĉiela graco: prosperigu ilin donante al ili ĉian feliĉigaĵon: kaj konduku ilin al via eterna regno: pere de Jesuo Kristo nia Sinjoro. *Amen.*

*Preĝo por la pastraro kaj la laikaro.*

**Ĉ**I OPOVA kaj eterna Dio, kiu sola faras grandajn miraklojn, sendu sur niajn episkopojn kaj parohestrojn, kaj sur ĉiujn kristanarojn alkonfidaĵojn al ilia zorgado, la sanigan Spiriton de via graco: Plie, por ke ili vere plaĉu al vi,

elverŝu sur ilin la roson de via daŭra beno: donu tion, Sinjoro, je la honoro de nia Advokato kaj Perulo, Jesuo Kristo. *Amen.*

*Preĝo de Sta. Krisostom.*

**Ĉ**I OPOVA Dio, kiu nin permesas nuntempe fari al vi niajn komunajn preĝojn unuanime, kaj promesas, ke kiam du aŭ tri estas kunvenintaj en via nomo, vi plenumos iliajn petojn: plenumu nun la dezirojn kaj petojn de viaj servantoj, kiel estos plej oportune por ili, donante al ni en ĉi tiu mondaĝo la sciadon pri via vero, kaj en la estonta mondo vivon eternan. *Amen.*

2 Kor. 13.

**L**A graco de nia Sinjoro Jesuo Kristo, kaj la amo de Dio, kaj la kuneco de la Sankta Spirito, estu kun ni ĉiuj por ĉiam. *Amen.*

*Jen finiĝas la ordo por Vespera Preĝo ĉiuseje tra la juro.*

## ĈE MATENA PREĜO.

*Je tiuj ĉi festtagoj:—Kristnasko, Epifanio, Sankta Matias, Pasko, Ĉieliro, Pentekosto, Sankta Johano la Baptisto, Sankta Jakobo, Sankta Bartolomeo, Sankta Mateo, Sankta Simon kaj Sankta Judas, Sankta Andreo, kaj je la Triunua Dimanĉo estu kantata aŭ dirata je la Matenpreĝo unŝtataŭ la Kredaĵo de la Apostoloj, ĉi tiu konfesaĵo de nia Kristana Kredo, kutime nomata la Kredaĵo de Sankta Atanasio, de la Pastro kaj la ĉeestantoj, kiuj dume staru.*

### QUICUNQUE VULT.

**K**IU ajn volas esti savata: antaŭ ĉio estas necese, ke li tenu la katolikan Kredon.

Kiun Kredon se ĉiu ne estas gardinta tuta kaj pura: nedube tiu por eterne percos.

Jen estas la katolika Kredo: ke ni adoru unu Dion en Triunuo, kaj Triunoon en Unuo:

nek internuksante la personojn: nek apartigante la esencen.

Ĉar estas unu persono de la Patro, alia de la Filo: kaj alia de la Sankta Spirito.

Sed la Dico de la Patro, de la Filo, kaj de la Sankta Spirito estas unu: la gloro egala, la majesteco kuneterna.

Kia estas la Patro, tia estas la Filo: kaj tia estas la Sankta Spirito.

La Patro nekreita, la Filo nekreita: kaj la Sankta Spirito nekreita.

La Patro senlima, la Filo senlima: kaj la Sankta Spirito senlima.

La Patro eterna, la Filo eterna: kaj la Sankta Spirito eterna.

Tamen ne estas tri eternaj: sed unu eterna.

Ankaŭ ne estas tri senlimaj, nek tri nekreitaj: sed unu nekreita, kaj unu senlima.

Tiel sammaniere la Patro estas ĉiopova, la Filo ĉiopova: kaj la Sankta Spirito ĉiopova.

Tamen ne estas tri ĉiopovaj: sed unu ĉiopova.

Tiamaniere la Patro estas Dio, la Filo estas Dio: kaj la Sankta Spirito estas Dio.

Tamen ne estas tri Dioj: sed unu Dio.

Tiel same la Patro estas la Sinjoro, la Filo estas la Sinjoro: kaj la Sankta Spirito estas la Sinjoro.

Tamen ne estas tri Sinjoroj: sed unu Sinjoro.

Ĉar sammaniere kiel ni estas devigataj per la Kristana vero: konfesi ĉiun personon aparte esti Dio kaj la Sinjoro;

tiel ni estas malpermesataj per la katolika Religio:

## ĈE MATENA PREĜO.

diri ke ekzistas tri Dioj, aŭ tri Sinjoroj.

La Patro estas farita de neniu: nek kreita, nek generita.

La Filo devenas el la Patro sola: nek farita, nek kreita, sed generita.

La Sankta Spirito estas el la Patro kaj la Filo: nek farita, nek kreita, nek generita, sed eliranta.

Estas do unu Patro, ne tri Patroj; unu Filo, ne tri Filoj: unu Sankta Spirito, ne tri Sanktaj Spiritoj.

Plie, en ĉi tiu Triunuo neniu estas antaŭ aŭ post alia: neniu estas pli granda aŭ malpli granda ol alia;

sed la tutaj tri personoj estas kuncternaj: kaj kunegalaj.

En ĉio do, kiel estis antaŭe dirite: la Unuo en Triunuo kaj la Triunuo en Unuo devas esti adorata.

Tial kiu volas esti savata: tiu devas tiamaniere pensi pri la Triunuo.

Plie, necese estas al eterna savstato: ke tiu ankaŭ ĝuste kredu la enkarnigon de nia Sinjoro Jesuo Kristo,

ĉar la ĝusta kredo estas, ke ni kredas kaj konfesas: ke nia Sinjoro Jesuo Kristo, la Filo de Dio, estas Dio kaj Homo;

Dio el la esenco de la Patro, generita antaŭ la

mondaĝoj: kaj Homo el la esenco de sia Patrino, naskita en la mondaĝo;

perfekta Dio, kaj perfekta Homo: el racia animo kaj homa karnokonsistanta;

al la Patro egala, rilate sian Diecon: kaj al la Patro malsupera rilate sian homecon,

kiu kvankam li estas Dio kaj Homo: tamen li ne estas du, sed unu Kristo;

unu—ne per la ŝanĝigo de la Dieco en la karnon: sed per la alprenado de la homeco en Dion;

unu tute—ne per ia intermikso de esenco: sed per la unuigo de la persono,

ĉar kiel la racia animo kaj karno estas unu homo: tiel la Dio kaj la Homo estas unu Kristo:

kiu suferis pro nia savo: malsupreniris en la inferon, revivigis la trian tagon el la mortintoj,

supreniris en ĉielon, sidas dekstre de la Patro, Dio ĉiopova: kaj de tie venos por juĝi la vivulojn kaj la mortintojn.

Ĉe ties alveno ĉiuj estos relevataj kune kun siaj korpoj: kaj donos respondon pri siaj propraj agoj:

la bonfarintoj foriros en vivon eternan: kaj la malbonfarintoj en fajron eternan.

## ĈE MATENA PREGO.

Jen estas la katolika kredo : kiun se iu ne estos fidele kredinta, tiu ne povos esti savata.

Gloro al la Patro, kaj al

la Filo : kaj al la Spirito Sankta ; kiel estis en la komenco, nun estas : kaj estos ĉiam, eterne. Amen.

## LA LITANIO.

¶ *Tie ĉi sekvas la LITANIO, aŭ Ĝenerala Petegaro, kantenda aŭ direnda post Matena Preĝo dimancojn, merkredojn, kaj vendredojn, kaj alifoje kiam la spirita superulo estos tiel ordoninta.*

**D**IO, la Patro, de la Ĉielo : kompatu al ni, kompatindaj pekuloj.

*Dio, la Patro de la Ĉielo : kompatu al ni, kompatindaj pekuloj.*

Dio, la Filo, Elaĉetinto de la mondo : kompatu al ni, kompatindaj pekuloj.

*Dio, la Filo, Elaĉetinto de la mondo : kompatu al ni, kompatindaj pekuloj.*

Dio, la Spirito Sankta, de la Patro kaj la Filo devenanta : kompatu al ni, kompatindaj pekuloj.

*Dio, la Spirito Sankta, de la Patro kaj la Filo devenanta : kompatu al ni, kompatindaj pekuloj.*

Sankta, laŭdata, glora Triunuo, tri Personoj, unu Dio : kompatu al ni, kompatindaj pekuloj.

*Sankta, laŭdata, glora Triunuo, tri Personoj, unu Dio : kompatu al ni, kompatindaj pekuloj.*

Ne memoru, Sinjoro, niajn ofendojn, nek la ofendojn de

niaj prapatroj ; nek venĝu al ni niajn pekojn : indulgu nin, bona Sinjoro, indulgu vian popolon, kiun vi elaĉetis per via altvalora sango, kaj ne por ĉiam kontraŭ ni koleru.

*Indulgu nin, bona Sinjoro.*

De ĉia malbono kaj difekto, de la peko, de la ruzoj kaj atakoj de la diablo, de via kolero, kaj de eterna kondamno,

*liberigu nin, bona Sinjoro.*

De ĉia korblindeco, de malhumileco, vanta gloro, kaj hipokriteco, de la envio, la malamo, kaj la malico, kaj de ĉia malbonkoreco,

*liberigu nin, bona Sinjoro.*

De la malĉasteco, kaj ĉia alia mortiga peko, kaj de ĉiu trompo de la mondo, la karno, kaj la diablo,

*liberigu nin, bona Sinjoro.*

De fulmo, kaj ventego, de

LA LITANIO.

pesto, epidemio, kaj malsatego, de batalo kaj hommortigo, kaj de neantaŭvidita morto,

*liberigu nin, bona Sinjoro.*

De ĉia ŝtatdisigo, konspiro sekreta kaj ribelo, de ĉia malveradoktrino, herezo, kaj skismo, de kormalmoleco kaj malestimo al viaj vorto kaj ordono,

*liberigu nin, bona Sinjoro.*

Per la mistero de via sankta enkarniĝo, per via sankta naskiĝo kaj circumcido, per viaj bapto, fasto, kaj tento,

*liberigu nin, bona Sinjoro.*

Per viaj agonio kaj sangutforma svito, per viaj kruco kaj sufero, per viaj altvalora morto kaj entombigo, per viaj gloraĵoj releviĝo kaj ĉieliro, kaj per la alveno de la Sankta Spirito,

*liberigu nin, bona Sinjoro.*

En ĉiu tempo de nia mizero, en ĉiu tempo de nia bonstato, en la horo de morto kaj en la tago de juĝo,

*liberigu nin, bona Sinjoro.*

Ni pekuloj vin petegas nin aŭskulti, Sinjoro Dio, kaj ke al vi plaĉu ĝuste regi

kaj konduki vian sanktan Eklezion universala :

*ni vin petegas nin aŭskulti, bona Sinjoro.*

Ke al vi plaĉu gardi kaj fortigi en la vera adorado al vi, en justa kaj sankta vivmaniero vian servanton, *GEORGON*, nian plej bonvolan reĝon kaj reganton,

*ni vin petegas nin aŭskulti, bona Sinjoro.*

Ke al vi plaĉu regi lian koron en fido, timo, kaj amo al vi, kaj ke li ĉiam konfidu al vi kaj konstante celu vian honoron kaj gloron,

*ni vin petegas nin aŭskulti, bona Sinjoro.*

Ke plaĉu al vi esti lia defendantokaj konservanto, donante al li, ke li venku ĉiun malamikon lian,

*ni vin petegas nin aŭskulti, bona Sinjoro.*

Ke plaĉu al vi beni kaj konservi nian bonvolan Reĝinon *Marion*, *Aleksandrinon* la Reĝinpatrinon, *Eduardon* la Princon de *Kimrujo*, kaj la tutan reĝan familion,

*ni vin petegas nin aŭskulti, bona Sinjoro.*

Ke plaĉu al vi lumigi ĉiun episkopon, presbiteron, kaj diakonon per vera scio kaj kompreno pri via vorto, kaj ke ili per sia predikado kaj vivmaniero ĝin taŭge prezentu kaj klarigu;

## LA LITANIO.

*ni vin petegas nin aŭskulti, bona Sinjoro.*

Ke plaĉu al vi plenigi la nobelojn de la Konsilantaro, kaj la tutan nobelaron, je graco, saĝeco, kaj komprenado ;

*ni vin petegas nin aŭskulti, bona Sinjoro.*

Ke plaĉu al vi beni kaj konservi la leĝadministrantojn, donante al ili gracon por fari juĝon kaj subteni la veron ;

*ni vin petegas nin aŭskulti, bona Sinjoro.*

Ke plaĉu al vi beni kaj konservi la tutan popolon vian ;

*ni vin petegas nin aŭskulti, bona Sinjoro.*

Ke plaĉu al vi doni al ĉiu nacio unuecon, pacon, kaj konkordon ;

*ni vin petegas nin aŭskulti, bona Sinjoro.*

Ke plaĉu al vi doni al ni koron amantan kaj timantan vin, por ke ni zorge vivu laŭ viaj ordonoj ;

*ni vin petegas nin aŭskulti, bona Sinjoro.*

Ke plaĉu al vi doni al via tuta popolo pli da graco, por ke ili humile aŭskultu vian vorton kaj ricevu ĝin kordincline kaj produktu la fruktojn de la Spirito ;

*ni vin petegas nin aŭskulti, bona Sinjoro.*

Ke plaĉu al vi konduki en

la vojon de la vero ĉiun eraranton kaj trompitan ;

*ni vin petegas nin aŭskulti, bona Sinjoro.*

Ke plaĉu al vi fortikigi la starantojn, kaj konsoli kaj helpi la anime malfortajn, kaj levi la falintojn : kaj fine faligi Satanon sub niajn piedojn ;

*ni vin petegas nin aŭskulti, bona Sinjoro.*

Ke plaĉu al vi subteni, helpi, kaj konsoli ĉiun, kiu estas en danĝero, neceso, kaj mizero ;

*ni vin petegas nin aŭskulti, bona Sinjoro.*

Ke plaĉu al vi konservi ĉiun, kiu veturas sur la tero aŭ la maro, ĉiun akuŝantinnon, ĉiun malsanulon, kaj ĉiun infanon, kaj kompati ĉiun maliberulon kaj militkaptiton ;

*ni vin petegas nin aŭskulti, bona Sinjoro.*

Ke plaĉu al vi provizi por la senpatraj infanoj kaj la vidvinoj, kaj por ĉiu, kiu estas forlasita kaj premata, kaj defendi ilin ;

*ni vin petegas nin aŭskulti, bona Sinjoro.*

Ke plaĉu al vi kompati al ĉiuj homoj ;

*ni vin petegas nin aŭskulti, bona Sinjoro.*

Ke plaĉu al vi pardoni niajn malamikojn, persekutantojn, kaj kalun-

LA LITANIO.

niantojn, kaj konverti ilin ;

*ni vin petegas nin aŭskulti, bona Sinjoro.*

Ke plaĉu al vi doni kaj konservi al ni la uzon de la laŭspecaj fruktoj de la tero, por ke ĝustatempe ni ĝuu ilin ;

*ni vin petegas nin aŭskulti, bona Sinjoro.*

Ke plaĉu al vi doni al ni veran penton, pardoni al ni niajn pekojn, malzorgojn, kaj nescion, kaj nin plenigi per la graco de via Sankta Spirito, por ke ni reformu nian vivon laŭ via sankta Vorto ;

*ni vin petegas nin aŭskulti, bona Sinjoro.*

Filo de Dio : nin aŭskulti, ni petegas vin.

*Filo de Dio : nin aŭskulti, ni petegas vin.*

Ŝafido de Dio : kiu forportas la pekon de la mondo ;

*donu al ni vian pacon.*

Ŝafido de Dio : kiu forportas la pekon de la mondo,

*kompату al ni.*

Kristo, aŭskultu nin.

*Kristo, aŭskultu nin.*

Sinjoro, kompату nin.

*Sinjoro, kompату nin.*

Kristo, kompату nin.

*Kristo, kompату nin.*

Sinjoro, kompату nin.

*Sinjoro, kompату nin.*

¶ *Tiam la presbitero, kaj la ĉeestantoj kune kun li, diru la Preĝon de la Sinjoro.*

**P**ATRO nia, kiu estas en la ĉielo : via nomo estu sanktigita : via regno venu : via volo estu farita, kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero : nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ : kaj formetu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni formetas al niaj ŝuldantoj : kaj ne konduku nin en tenton, sed liberigu nin de la malbona. Amen.

*Presbitero.* Sinjoro, ne laŭ niaj pekoj agu kontraŭ ni.

*Respondo.* Ne laŭ niaj krimoj repagu al ni.

Ni preĝu.

**D**IO, Patro de kompatoj, kiu ne malestimas la sopiron de penta koro, nek la deziron de la malĝojulo, kompateme helpu niajn preĝojn, kiujn ni faras antaŭ vi en ĉiuj niaj kontraŭaĵoj kaj mizeregoj, kiam ajn ili nin premas : kaj korfavore aŭskultu nin, por ke tiuj malbenoj, kiujn la trompo kaj ruzo de la diablo aŭ homo uzadas kontraŭ ni, estu nuligitaj, kaj per via boneca antaŭzorgo estu disigitaj : por ke ni, viaj servantoj, difektite de neniaj persekutoj, konstante donu al vi dankojn en via sankta



LA LITANIO.

Eklezio pere de Jesuo Kristo  
nia Sinjoro.

*Sinjoro, leviĝu, helpu, kaj  
liberigu nin pro via nomo.*

**D**IO, ni aŭdis per niaj  
oreloj, kaj niaj patroj  
al ni rakontis la noblajn  
agojn, kiujn vi faris en iliaj  
tagoj kaj en la pratempo.

*Sinjoro, leviĝu, helpu, kaj  
liberigu nin pro via honoro.*

Gloro al la Patro, kaj al la  
Filo: kaj al la Spirito  
Sankta;

*Respondo.* kiel estis en  
la komenco, nun estas: kaj  
estos ĉiam, eterne. Amen.

De niaj malamikoj de-  
fendu nin, Kristo.

*Korfavore rigardu niajn  
afliktojn.*

Kompateme rigardu la  
dolorojn de niaj koroj.

*Kompateme formetu la pe-  
kojn de via popolo.*

Favore laŭ via kompato  
aŭskultu niajn preĝojn.

*Filo de David, kompatu  
al ni.*

Nun kaj ĉiam bonvolu  
nin aŭskulti, Kristo.

*Bonkore nin aŭskultu,  
Kristo; bonkore nin aŭs-  
kultu, Sinjoro Kristo.*

*Presbitero.* Sinjoro, mon-  
triĝu al ni via kompato,

*Respondo.* tial, ke ni vin  
fidas.

Ni preĝu.

**H**UMILE ni petegas vin,  
Patro, kompate ri-  
gardi niajn malfortojn, kaj  
pro la gloro de via nomo  
turnu for de ni ĉiun mal-  
bonon, kiun ni plej juste  
meritas; kaj donu, ke en  
ĉiu mizero nia ni tutkore  
fidu kaj konfidu al via kom-  
pato, kaj konstante servu  
al vi per sankta kaj pura  
vivado al via honoro kaj  
gloro, pere de nia sola Perulo  
kaj Advokato, Jesuo Kristo  
nia Sinjoro. Amen.

*Preĝo de Sta. Krisostom.*

**Ĉ**IOPOVA Dio, kiu nin  
permesas nuntempe  
fari al vi niajn komunajn  
preĝojn unuanime, kaj pro-  
mesas, ke, kiam du aŭ tri  
estas kunvenintaj en via  
nomo, vi plenumos iliajn  
petojn: plenumu nun la  
dezirojn kaj petojn de viaj  
servantoj, kiel estos plej  
oportune por ili, donante al  
ni en ĉi tiu mondaĝo la  
sciadon pri via vero, kaj en  
la estonta mondo vivon  
eternan. Amen.

2 Kor. 13.

**L**A graco de nia Sinjoro  
Jesuo Kristo, kaj la  
amo de Dio, kaj la kuneco  
de la Sankta Spirito, estu  
kun ni ĉiuj por ĉiam. Amen.

*Jen finiĝas la LITANIO.*

————— A SELECTION OF —————

# ESPERANTO LITERATURE

Any of the following books may be had by applying to the Sec.,  
BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (Incorporated),  
17 Hart Street, London, W.C. 1.

All profits arising from the sale of these works are devoted  
by the Association to the propaganda of Esperanto.

	PRICES, POST FREE.
	s. d.
Fundamento da Esperanto, D-ro Zamenhof . . . . .	3 2
Esperantaj Prozaĵoj (Graduated Readings) . . . . .	2 9
Esperanto Manual, Marg. L. Jones . . . . .	1 8
Grammar and Commentary, Maj.-Gen. G. Cox . . . . .	3 3
Complete Esp.-Eng. Dictionary, Millidge (3rd Ed.) . . . . .	7 9
“Edinburgh” Pocket Dictionary . . . . .	1 7½
English-Esperanto Dictionary, J. Rhodes . . . . .	5 6
Popola Frazlibro, Deshays . . . . .	0 8
Fundamenta Krestomatio, D-ro Zamenhof Paper 4s. 5d., bound . . . . .	5 9
Hamleto (Shakespeare), D-ro Zamenhof . . . . .	2 3
Nova Sento, “Tagulo” . . . . .	1 10
Lilio. E. Alleyne Sinnotte . . . . . cloth	2 9
Mirinda Amo, H. A. Luyken . . . . . cloth	3 11
New Testament (in Esp.), according to binding 2s. 6½d. to . . . . .	8 8½
Predikanto, La (Ecclesiastes), D-ro Zamenhof . . . . .	0 10½
Stranga Idilio (Bates), H. Harris . . . . .	0 10
Travivaĵoj de Roŝo . . . . .	1 8
Venecia Komercisto (Shakespeare), Wackrill . . . . .	1 8½
An International Language (in Esperanto and English), Zamenhof-Wackrill . . . . .	0 7½
Kvarvoĉaj Kantoj . . . . .	0 3½
Keys in Danish, Dutch, English, Finnish, French, German, Hungarian, Italian, Portuguese, Spanish, Swedish, and Welsh . . . . .	4 0

————— A Full List of Esperanto Publications will be sent  
Post Free on Application. —————